

Saĝo-Sako

Ĉinaj Popolaj Rakontoj

Ĉina Esperanto-Eldonejo

1983

e-Librigita de ELERNO

majo 2006

Mongolaj popolrakontoj

Rakontoj pri Balagenca

Saĝo-sako

La saĝeco de Balagenca estis fame konata por ĉiuj. Oni ofte diris: Plej multnombros la brutaro de princo, sed plej abundas la saĝo de Balagenca. Aŭdinte tiujn vortojn, iu tre fiera kaj memfida nobelo koleregis:

“Absurdaĵo! Kiu el la sklavoj povus esti pli saĝa kaj pli prudenta ol ni nobeloj? Mi volas vidi, kiom da kapoj Balagenca havas.”

Post tio, la nobelo ĉie serĉadis Balagenca por kompari, kiu efektive estas pli saĝa.

Iun tagon la nobelo ĉevalrajdis sur stepo kaj renkontis Balagenca, kiu ripozis kaj fumis, sin apogante al oblikve staranta arbo. Li demandis sen elseliĝi:

“Ĉu vi estas Balagenca?”

Balagenca levis la okulojn kaj vidis, ke la demandinto estas nobelo. Li do restis senmova kaj nur murmuris:

“Jes, ĝuste.”

“Oni diras, ke vi estas kompetenta por trompi, ĉu vere?”

“Tian honoron mi ne meritas, Via Moŝto. Sed oni diras, ke mi estas la plej saĝa.”

“Nu, bone. Hodiaŭ mi konkuru kun vi, kaj ni vidos, kiu estas pli saĝa. Se vi sukcesos trompi min, mi do konfesos mian perdon. Alie, mi dehakos vian kapon per mia sabro!”

“Ne, hodiaŭ mi ne povas konkuri kun vi, ĉar mi ne havas mian saĝo-sakon ĉe mi. Alie, eĉ la imperiestron mi aŭdacus trompi,” diris Balagenca ŝajnigante sin maltrankvila.

Tiu diro des pli kolerigis la nobelon.

“Rapidu preni la saĝo-sakon, kaj mi ĉi tie vin atentos.”

“Kiam mi povos reveni, se mi piediros? Nu, por ke vi ne opiniu min timulo, mi propones elekti alian tagon por nia konkuro. Krome, hodiaŭ mi estas okupita.”

“Ne!” eksplodis la nobelo. “Ni nepre konkuru hodiaŭ! Rajdu sur mia ĉevalo, se vi opinias piediradon tro malrapida.”

“Ne, ne! Hodiaŭ mi ne havas tempon.”

“Kial?”

“Ĉu vi ne rimarkis, Via Moŝto, ke ĉi tiu arbo baldaŭ falos. Mi apogas ĝin per la korpo kaj tial ne povas foriri.”

“Lasu tion al mi! Kaj rapidu for!” la nobelo donis sian ĉevalon al Balagenca kaj ekapogis la arbon tutforte.

“Kion fari? Ŝajne vi nepre devigas min trompi vin,” diris Balagenca.

“Ne fanfaronu! Se vi malvenkos, gardu vian kapon!” mokridis la nobelo.

“Do, mi trompu vin, Via Moŝto. Bonvolu bone apogi la arbon kaj gardi vin kontraŭ lupoj.

Mi iros preni la saĝo-sakon! ...” Balagenca saltis sur la ĉevalon de la nobelo kaj ĝin spronis. La ĉevalo galopis sur la stepo. Sed, li neniam revenis.

Elirigi Princon el Portoseĝo

Iun tagon princo iris eksteren per granda portoseĝo portata de ok homoj. Antaŭ kaj post li svarmis sekvantoj kaj gardistoj dum bruis tamtamado kaj tamburado. Ho, kiel majesta parado! Survoje ili hazarde renkontis Balagenca.

“Kiu aŭdacas ne genuiĝi ĉe la vojo?” kriis la princo, kiu estis tiel kolera, ke liaj okuloj pligrandiĝis kaj lia barbo hirtiĝis.

“Estas Balagenca, Via Princa Moŝto,” diris iu sekvanto tirante Balagenca al la princo, “neniŝtima Balagenca.”

“Jes, mi estas Balagenca,” aldonis ne haste Balagenca, “sed mi ne rekonas vin, Via Princa Moŝto.”

“Aha! ... Ĝuste vi estas Balagenca?” surpriziĝis la princo. “Oni liras, ke vi estas la plej trompema, ĉu ne?”

“Ne, mi ne meritas. Mi plej ŝatas diri veron.”

“Ĉiuj diras, ke vi estas la plej inĝenia. Ĉu vi kapablas elirigi min el la portoseĝo per trompo?” kontente ridaĉis la princo, opiniante lin jam metita en embarason.

“Kiel mi kuraĝus elirigi Vian Princon Moŝton el la portoseĝo? Tamen, se Via Princa Moŝto eliros el via portoseĝo, mi tiam povos igi vin suriri.”

“Ĉu vere?”

“Ja, tiun bagatelon mi, senindulo, facile plenumos.”

La princo pensis: Ĉiokaze mi ne resuriros en la seĝon. Kion vi faros tiam?! “Bone!” Li do konsentis kaj

elsaltis el la portoseĝo.

Ĝuste kiam la princo ekstaris sur la tero, Balagenca ridis: “Via Prudenta Princa Moŝto, ĉu mi ne sukcesis elirigi vin per trompo?”

La princo ekgapis konsternite. Li senvorte residiĝis en la portoseĝon. Vidinte, ke la vizaĝo de la princo misformiĝis de kolerego, ĉiuj sekvantoj subridis.

“Centprocenta trompisto! Levu la portoseĝon! Ekiru!” ordonis la princo kolerege.

Apenaŭ ili ekpaŝis, aŭdiĝis la voĉo de Balagenca:
“Momenton!”

La princo rapide haltigis la portoseĝon kredante, ke Balagenca denove elpensis ian ruzaĵon. Balagenca ridegis:

“Dankon, Via Princa Moŝto, ke vi refoje obeis mian ordonon kaj haltigis vian portoseĝon!”

Dirinte tion, Balagenca tuj ekgalopis for.

Vosto de Ora Mustelo

Revenante post vizito al parenco, Balagenca renkontis ŝafpaŝtan infanon ploregantan. Li desaltis de sia ĉevalo kaj demandis pri la kialo. Jen riĉulo Bolredaj asertis, ke la infano paŝtis siajn ŝafojn sur lia paŝtejo kaj ĝin preskaŭ ruinigis, pro tio li forrabis la ĉevalon de la infano. Balagenca akompanis la infanon al lia hejmo. Antaŭ sia foriro li flustris al la infano:

“Ne maltrankviliĝu. En la tria tago mi donos al vi bonan ĉevalon.”

Balagenca bone sciis, ke Bolredaj estas tre avara — ke li preferas unu moneron al sia vivo. Balagenca serĉadis ŝancon kaj trovis iufoje, ke Bolredaj rapide alrajdas sur dezerta montvojeteto. Kiam Bolredaj alproksimiĝis, Balagenca svingis la manon, por ke li ne proksimiĝu.

Bolredaj ekscivolis pri kio temas, subite vidinte, ke iu kaŭras sur la herboriĉa montdeklivo kaj maltrankvile svingas al li la manon. Li desaltis de sia ĉevalo kaj piedpinte proksimiĝis al Balagenca.

“Kiom abomeninda vi estas!” diris Balagenca kolere, tamen mallaŭte. “Mi jam signis, ke vi ne proksimiĝu. Kaj vi rekte venis ĉi tien! Jen, jen! Vi preskaŭ fortimigis mil uncojn da arĝento!”

Bolredaj estis eksplodonta de kolero, sed aŭdinte pri mil uncoj da arĝento, li tuj kvietiĝis. Atente observinte, li trovis, ke la kaŭranto garde atendas ĉe trueto, tenante oran, vilan voston en la mano. Li flustris

ĉe la orelo de Balagenca:

“He! Kion vi kaptis?”

“Kion? Ĉu vi ne vidas? Tio estas altvalora ora mustelo. Pot donaci al la imperiestro la princo volonte pagos eĉ mil uncojn da arĝento por ĝi. La Budho benis min, ke mi renkontas tian beston. Mi ĉasis ĝin, sed ĝi enkuris en tiun truon tiel rapide, ke mi apenaŭ povis kapti ĝian voston. Sed nun, mi ne scias, kiel eltiri ĝin.”

Bolredaj dronis en revo pri profito. Kiam li aŭdis, ke temas pri ora mustelo, lia koro ŝajnis baldaŭ elsalti el lia brusto. Kaj li kriis pro ĝojo:

“Forte! Forte ĝin eltiru!”

“Ŝŝ! Ĉu vi freneziĝas?” grimacis Balagenca. “Ĉu vi ne scias, ke ĝi neniom valoros, se oni desiros ĝian voston? Kaj estus eble, ke la princo dehakigus vian kapon, se li informiĝus pri tio. Amiko, ĉu vi povus helpi al mi?”

“Tre volonte!” entuziasmis la maljuna avidulo. “Oni diris: ‘Fremdan havaĵon trafante, havu l’ duonon kontante.’ Se ĝi estos elfosita, ĝi apartenos al ni ambaŭ.”

“Ha, vi estas pli ruza ol riĉulo Bolredaj, kiun mi, Balagenca, ne rigardas kiel rivalon. Sed mi devas konfesi, ke mi nun renkontis veran rivalon.”

“Ha ha ha... vi estas Balagenca? Nu, fanfaronulo, sciu, ĝuste mi estas Bolredaj. Donu al mi ĉi tiujn mil uncojn kiel konatiĝan donacon!”

“Kio? Ĉu vi estas Bolredaj?” sin ŝajnigante surprizita, diris Balagenca, “Ve, malbeno al mi! Kial ĝuste nun min trafis la plej granda avidulo!”

“Ĉu vi jam konfesas vian malvenkon?” kontente diris la fimaljunulo. “Sciu, ke multe pli da vino mi drinkis, ol da laktoteo vi trinkis.”

“Oj, min trafis malfeliĉo! Bonvolu do rajdi al najbara vilaĝo kaj pruntepreni fosilon.”

Bolredaj surĉevaliĝis, sed post kelkaj paŝoj li revenis, ĉar li pensis, ke Balagenca, tiom ruza, certe lin sendas for por mem elfosi la oran mustelon kaj proprigi al si la tutan kvanton da arĝento. Li do diris al Balagenca:

“Estas pli bone, ke vi iru preni fosilon, kaj mi ĉi tie atendu.”

“Kiel suspektema vi estas!” kolere respondis Balagenca. “Kiam mi revenos, piedirinte tien?”

“Nu, bone, rajdu sur mia ĉevalo.”

“Bone! Sed vi sciu, ke mi, Balagenca, estas mistifikema. Se mi forrajdos sur via ĉevalo, mi eble ne revenos.”

“Ha ha ha... vi, fripono, ne ruzu kontraŭ mi! Mi preferas aldoni ankoraŭ tri ĉevalojn kontraŭ tiu ora mustelo. Ĉu vi konsentas?”

“Estu tiel! Kion fari kontraŭ vi, tia ruzulo?” ĝemis Balagenca kun mieno, kvazaŭ li havus nenian rimedon. “Venu ĉi tien, sed ne deŝiru la voston. Vi nepre atendu mian revenon kun fosilo. Alie, tio vaporigos,” li insistis kaj fulme forgalopis per la ĉevalo en la direkto al la vilaĝo, kie loĝis la ŝafpaŝta infano.

Sur la dezerta, herboriĉa montdeklivo la maljuna avidulo Bolredaj atendis kaj atendis, tenante la voston de

tiu “ora mustelo”. Iom post iom mallumiĝis. Lin atakis kaj malsato kaj malvarmo; li iĝis pli kaj pli laca, pli kaj pli timema. Fine li ne povis deteni sin de dormemo kaj baldaŭ endormiĝis. Subite la vosto eltruiĝis pro senintenca ekmovado de liaj manoj. Li vekigis pro timo, ke li deŝiris la voston de la “ora mustelo” kaj la besteto jam forkuris. Li freneze fosadis en la tero per ambaŭ manoj, ĝis li trovis ĉe la tagiĝo nenian spuron de mustelo. Li fine atente rigardis la voston kaj vidis, ke ĝi tute ne estas vosto de ora mustelo. Ekkonsciinte, ke li estas trompita, li tuj svene falis teren pro kolerego kaj maltrankvilo.

Tibetaj popolrakontoj

Rakonto j pri Agu Dumba

Lukto

Antaŭe, en la klano Docan estis centfamiliestro, kiu nomiĝis Ĝenlo. Li havis la forton de dek du gruntbovoj kaj scipovis lerte lukti. Multe da homoj mortis en la luktoj kun li, kaj ĉiuj, kiuj restis vivaj post la lukto, devis servi kiel liaj servutuloj laŭ regulo difinita de li. Ili devis paŝti por li ŝafojn kaj suferi dum la tuta vivo.

En ĉiu festo li aranĝis placeton kiel luktejon, ĉe kiu li paradis per aro da ĉevaloj, gruntbovoj kaj grasaj ŝafoj, kaj ankaŭ sternis felojn. Sur flago-stango pendis ŝildo, sur kiu oni legis:

Ĉiu bravulo, kiu povos renversi la centfamiliestron Ĝenlo, gajnos dek ĉevalojn, dek gruntbovojn kaj kvindek grasajn ŝafojn kaj krome ankoraŭ kelke da feloj, se la centfamiliestro faligos la bravulon, tiu ĉi devos senpage labori ĉe li por tri jaroj.

Ĉiuj sciis, ke la centfamiliestro estas malica. Sed por sin vivteni, malriĉaj paŝtistoj devis riski la vivon kaj multaj fariĝis liaj servutuloj post la luktoj. Laŭ la regulo ili devil labori ĉe li nur tri jarojn. Fakte ili fariĝis dumvivaj sklavoj, ĉar tiu senkorulo kalkulis tion: manĝaĵojn, vestojn, eĉ la kuŝejojn de la servutuloj dum la tri jaroj kiel iliajn ŝuldojn, tiel ke la ŝuldoj de la servutuloj fariĝis pli kaj pli multaj, kaj tial ili neniam povis kvitiĝi kun li. Tiamaniere li riĉiĝis pli kaj pli.

Pasis jaroj, kaj venis ĉevalkonkurso. Centfamiliestro Ĝenlo aranĝis luktejon kiel kutime. Pasis jam longa tempo, sed ankoraŭ neniu suriris la placeton.

Subite bela paŝtisto rajdanta sur gruntbovo kun kupraj tintiloj alvenis al la luktejo. Surprizite, ĉiuj deflankiĝis por cedi al li vojon. Tiu ĉi paŝtisto ne desaltis por fari riverencon al la centfamiliestro, nek prezentis hadaon* al li laŭ la kutimo. Li rekte alrajdis la centron de la luktejo, kvazaŭ ne vidinte la centfamiliestron.

La centfamiliestro eksplodis de furiozo. Sidante sur brokaĵa kuseno, li minacvoĉe kriis: “He! Birdeto sen elkreskintaj flugiloj aŭdacas konkuri kun aglo! Infano kun molaj brakoj aŭdacas lukti kun mi! Kiu vi estas?”

Desaltinte de sur la gruntbovo, la paŝtisto respondis: “Subtaksata birdeto ofte flugas pli alte ol aglo; malestimata infano ofte kuras pli rapide ol plenaĝulo. Sen kuraĝo de leopardo oni ne aŭdacas veni al vi.”

Ruĝiĝinte de kolerego, la centfamiliestro eksaltis kaj demetis sian peltaĵon. Minacante per la korpo bestsimila li pasis al la centro de la luktejo kaj demandis: “Ĉu vi povas faligi min?”

La paŝtisto kapjesis: “Mi provu! ”

La centfamiliestro arogante diris: “Se vi renversos min, mi donos al vi ĉiujn miajn bovojn, ŝafojn kaj ĉevalojn; sed se vi estos venkita, vi do estos mia servutulo dum la tuta vivo.”

La paŝtisto skuis la kapon: “Ne, centfamiliestro! Mi ne deziras bovojn, nek ŝafojn, nek ĉevalojn...”

“Kion do vi volas? Ĉu paŝtejon aŭ oron?”

“Ne!”

“Kion do?”

“Se mi estos venkita, mi volonte restos via servutulo dum la tuta vivo.”

“Kompreneble! Tio estas nia rutino.”

“Se mi venkos, vi estos mia servisto.”

Surprizite, la centfamiliestro diris al si: “Ĉu en la mondo troviĝas ankoraŭ tiom aŭdaca ulo? Hm! Vi, maldika kiel skabia hundo, certe falos sub mia forto,” li kapjesis, “bone!”

La paŝtisto diris: “Vantaj vortoj estas senbazaj. Ni skribu dokumenton antaŭ la publiko.”

“Skribu do, se vi volas! Nenio ĝenas.”

“Ni subskribu ĝin ĉe la milfamiliestro.”

“Des pli bone!” La centfamiliestro tuj skribis dokumenton antaŭ ĉiuj. Poste ili ambaŭ iris al la milfamiliestro por subskribi ĝin.

Komenciĝis la lukto.

La centfamiliestro grincis per la dentoj kaj prenis pozon por interbatalo sur la centro de la luktejo, kvazaŭ li tuj povus disrompi la paŝtiston per unu pugnobato. Ĉirkaŭe, ĉiuj rigardantoj maltrankvilis pri la sorto de la paŝtisto.

Sed la paŝtisto trankvile kaj malrapide alpaŝis kaj ĉirkaŭprenis la talion de la centfamiliestro. Ambaŭ tordiĝis, premiĝis. La centfamiliestro provis abrupte renversi la paŝtiston, sed tiu ĉi staris firma kiel fera turo. La paŝtisto facile ekpuŝis la centfamiliestron per la

manoj kaj tiu ĉi jam ĵetiĝis kelkdek paŝojn for, kaj kuŝis tie senmova.

Ĉiuj hurais de ĝojo kaj ĵetis al la paŝtisto hadaon. La paŝtisto tion dankis per sinsekvaj riverencoj. Poste, li levis la centfamiliestron kiel sitelon kaj ordonis: “Nu, iru, mia servisto !”

La centfamiliestro baraktis por sin liberigi, sed nenio helpis. Li petadis: “Liberigu min, bravulo! Mi volonte donos al vi tiom da bovoj, ŝafoj kaj herbejoj kiom vi volas.”

“Ne ! ” decideme respondis la paŝtisto: “Ni, tibetanoj ne havas kutimon mensogi; sekvu min!” Li saltis sur sian gruntbovon kaj sin turninte al la centfamiliestro, li severe aldonis: “Se vi ne observos la dokumenton kaj ne sekvos min fidele, mi tuj frakasos vin!”

Nenio alia restis al la centfamiliestro, ol preni sur la dorson la ledsakon de la paŝtisto kaj postkuri la gruntbovon kiel hundeto.

Iu laŭte demandis la paŝtiston: “Ho, bravulo! Vi estas la plej kapabla homo. Bonvolu diri vian nomon!”

Returnante la kapon, la paŝtisto modeste respondis: “Mi tre dankas pro via favoro, amikoj! Mi nomiĝas Agu Dumba**.”

“Agu Dumba!” iuj ĝojkriis.

“Agu Dumba; la atleto de nia nacio!”

Oni admire rigardis la dorson de Agu Dumba, kaj iuj alkuris al li kaj petis: “Restu en nia klan!”

“Ne!” ridante respondis Agu Dumba, “mi vin

dankas, sed mi ankoraŭ havas multe da aferoi!”

* hadao: silka rubando ĝenerale blanka, kelkfoje ankaŭ ruĝa, flava aŭ helblua, kiun la tibetanoj kaj mongoloj prezentas al Dio, gastoj aŭ estimataj personoj por esprimi sian saluton aŭ gratulon

** Agu Dumba en la tibeta lingvo signifas “oĉjo Komikulo”.

“Ĉu Estas Ankoraŭ Aliaj

Ordonoj ?”

Estis bienulo, kiu ĉiam diris dungante iun: “Ne gravas, se mi devas multe pagi al vi, sed vi devas kapabli fari ĉion, kion mi postulas!” Fakte, ĉiuj laborintaj ĉe li kiel jaraj dungitoj sciis, ke eĉ por la Budho estus malfacile plenumi tion, kion li postulis de siaj dungitoj. Tiel en la jarfino li povis depreni ĉion de iliaj laborpagoj kaj eĉ ŝuldigis iujn.

Eksciinte pri tio, Agu Dumba tre indignis. Li konsentis ĉiujn kondiĉojn postulatajn de la bienulo kaj eklaboris ĉe li kiel jardungito.

La bienulo ordonis al Agu Dumba plugi kampon, postulante, ke li memoru, per kiom da paŝoj li plugis ĉiun kampon. Agu Dumba elpensis manieron por memori: Dum la plugado post ĉiu paŝo li tuj starigis herbotigon. Sed tio fine ne helpis. Li laboris la tutan tagon, fariĝis kaj laca kaj malsata, tial li foje starigis herbotigon kaj foje ne. Poste li tute forgesis tion fari.

Vespere la bienulo alrajdis memkontenta kaj demandis fiere: “Kiom da paŝoj vi plugis?”

Agu Dumba respondis: “Mi ne scias!” Larĝe malferminte la okulojn, la bienulo mokis: “Vi plugis, sed ne scias, kiom da paŝoj vi plugis!”

Subite bona ideo venis al Agu Dumba, kaj li demandis: “Vi alrajdis ĉi tien. Ĉu vi scias, kiom da paŝoj la ĉevalo galopis?” Trovinte nenion por respondi, la

bienulo returnis la ĉevalon kaj forrajdis.

Survoje la bienulo cerbumis por serĉi novan artifikon. Li ekmemoris, ke malantaŭ lia domo estas ŝtonego. Ĝi estis tiel granda kiel lia korto. Kiam Agu Dumba hejmeniris post la laborado, la bienulo tuj ordonis, ke li forportu tiun ŝtonegon. Agu Dumba tuj konsentis, sed aldonis, ke li bezonas centmetran ledŝnuron sen ia ajn nodo. Por reteni lian laborpagon, la bienulo aĉetis tre grandan sovaĝan bovon kaj ĝin bucis. Poste li sternis ĝian felon kaj spirale tranĉis ĝin de ekstere internen pot akiri sufiĉe longan ledŝnuron. Kaj per du ledŝnuro Agu Dumba ligis la ŝtonegon, sed ankaŭ petis, ke la bienulo helpe levu la ŝtonegon sur lian dorson.

Rondigante la okulojn, la bienulo kriis: “Kiel mi povus movi tiel grandan ŝtonon?”

Ĵetinte la ledŝnuron flanken, Agu Dumba respondis: “Kiel mi povus forporti ĝin, se vi ne povus ĝin eĉ levi?”

Tio ŝtopis la buŝon de la bienulo kaj ege ofendis lin, sed post kelkaj tagoj li denove venis al Agu Dumba kun fiintenco. Donante al Agu Dumba dek virbovojn, li ordonis, ke tiu hejmeniru kaj paŝtu ilin, kaj postulis, ke Agu Dumba donu al li 25 ujojn da butero ĉiun monaton. Ridante, Agu Dumba pelis la virbovojn hejmen kaj ĉiutage kondukis ilin sur monton, por ke ili transportu por li brullignon.

Pasis monato. La bienulo venis por la butero. Agu Dumba sidis silenta kaj nur mansvingis al li, por ke li ne plu bruu. La bienulo do mallaŭte demandis: “Kio

okazas?”

Agu Dumba diris mallaŭte: “Mia patro naskas. Nun li estas en malfacila akuŝo!”

Surprizite, la bienulo diris: “Al la Diablo! Ĉu viro naskas?”

Agu Dumba donis kontraŭdemandon: “Vi pravas, viro ne povas naski, do, ĉu oni povas melki virbovon por fari buteron?”

La bienulo denove estis venkita. Hejmenirinte, li kovis fiintencon la tutan nokton. Enla sekva tago li alvokis al si Agu Dumba kaj diris: “Mi havas du tre maldikajn ŝtonplatojn, el kiuj mi volas fari botojn. Vi frote preparu ilin.”

Agu Dumba konsentis senrezerve: “Antaŭ frotado de felo oni unue devas ĝin macere moligi, do bonvolu unue moligi la ŝtonplatojn!”

La bienulo multe klopodis, sed neniel povis reteni la la borpagojn de Agu Dumba. Male, li vane aĉetis tiun sovaĝan bovegion. Krome la dek bovoj transportis multe da brulligno por Agu Dumba. Kiel li povus kvietiĝi pro ĉio tio? Nature, li ankoraŭ volis fari aliajn novajn artifikaĵojn kontraŭ Agu Dumba, sed li timis pluan malprofiton. Pri tio li pensis tage kaj nokte kaj estis forte ĉagrenita. Fine li vole-nevole devis engluti la maldolĉan pilolon kaj pagi la salajron al Agu Dumba. Antaŭ sia foriro tiu ĉi demandis: “Via Bienula Moŝto, ĉu estas ankoraŭ aliaj ordonoj?”

Trezoro de Agu Dumba

Iun tagon multe da malriĉuloj iris viziti Agu Dumba. Ili diris: “Onklo Dumba, mizera estas nia vivo! Ĉu vi ne povas eltrovi ian rimedon por nin helpi?”

Pensinte momenton kun klinita kapo, Agu Dumba respondis: “Nu, bone, sekvu min.” Li kondukis ĉiujn al kamparo kaj, serĉinte tie kaj tie, fine trovis pecegon da tero ĉe rivero kaj diris: “Mi havas trezoron enterigitan ĉi tie, sed jam pasis tiel mutle da jaroj, ke mi ne povas memori la precizan lokon. Do, fosu, kaj mi ĝin donacos al vi, se vi trovos ĝin.” Li aldonis: “Alia afero atendas min. Se vi elfosos, diru al mi.” Tion dirinte, li foriris.

Ĉiuj penege fosadis. La suno fajre brulis, kaj ili ŝvitis abunde. Sed la malriĉuloj neniel perdis la kuraĝon kaj peneme laboris tage kaj nokte. Ili estis baldaŭ finfosontaj la terpecon, sed ankoraŭ nenia signo de la trezoro vidiĝis.

Veniginte Agu Dumba, la malriĉuloj demandis: “Kie estas la trezoro, onklo Dumba? Ni finfosis jam la terpecon!” Enŝovinte sian manon en la teron, Agu Dumba diris: “Ho ne, ne sufiĉas! Mi memoras, ke mi ĝin tre profunde enterigis.”

La malriĉuloj daŭrigis la laboron. Ili fosadis profunde, tiel ke eĉ vidiĝis akvo, sed tion ili ne zorgis. Ĉiuj faris firman decidon nepre trovi la trezoron.

Post kelkaj tagoj la tero estis jam finfosita, tamen la trezoro ankoraŭ ne trovita. Tiam Agu Dumba kaŝe enterigis ŝtonon en la mezo de la terpeco kaj laŭte kriis:

“Rapidu, ĉi tie estas la trezoro!”

Aŭdinte tion, ĉiuj alkuris kaj vidis, ke tie estas nur ŝtono. Ĉiuj mire demandis: “Onklo Dumba, tio ja estas nur ŝtono! Kial vi diras, ke ĝi estas trezoro?”

Agu Dumba respondis: “Krom tio mi havas nenion.”

Ĉiuj demandis plu: “Kion fari nun? Ni jam multe klopodis, kaj la tero estas tute taŭzita.”

Agu Dumba konsilis: “Akvumu la teron kaj poste disĵetu semojn.” La malriĉuloj agis laŭ la vortoj de Agu Dumba.

Kiam venis la rikolta aŭtuno, ili ricevis abundan grenon, kaj ilia vivo fariĝis senzorga. Nur tiam ili komprenis, kial onklo Dumba deziris, ke ili laboru kaj kulturu teron.

De tiam, por rememori la instruon de Agu Dumba, la tibetaj kamparanoj metas post plugado kelkajn ŝtonojn en la mezon de la kampo kaj nomas tion la trezoro donacita de Agu Dumba, per kio ili akiros riĉan rikolton.

Mi Postulas Nur Unu Sakon da

Zanbao*

Informite, ke la estro de la vilaĝo Erokan serĉas jaran dungiton, Agu Dumba iris al li kaj diris: “Via Estra Moŝto, lasu min servi al vi! Mi postulas ĉiufoje manĝi nur unu bovlon da zanbao kaj preni nur unu sakon da zanbao kiel jarsalajron.”

Aŭdinte, ke tiel forta homo postulas nur malgrandan laborpagon, la vilaĝestro, kompreneble, tuj konsentis.

Estis la horo por manĝi. La edzino de la vilaĝestro intence donis al Agu Dumba etan bovlon. Ĉiuj volis rigardi, kiel tiu forta viro povas satigi sin per tiel malgranda bovlo da manĝaĵo. Li aplombe verŝis teon en la bovelton, poste enŝutis zanbaon kaj knedis ĝin, ĝis ĝi fariĝis pasto. Tiam li denove verŝis teon kaj denove ŝutis zanbaon. Li ripetadis la samon, ĝis la zanbaa bulo fariĝis tiel granda, ke ĝi sufiĉis eĉ por homo malsatega. Tio tre doloris la familianojn de la vilaĝestro, sed ili tamen nenion povis fari krom akcepti la malfeliĉon.

Post la manĝo la vilaĝestro diris al li: “Mi bredas ŝafojn por lano. Vi manĝis tiel multe, do vi devas ankaŭ labori multe. Nu, vi kaj tiu ĉi bovo plugu la kampon okcidente de la vilaĝo!”

“Tio estas simple fiintenco por min meti en embarason! Ĉu per unu bovo oni povas plugi**? Cetere, la kampo, kiun mi devas plugi, estas tiel granda!” pensis

Agu Dumba, pelante la bovon antaŭen. Subite venis en lian kapon bona ideo. Li pelis la bovon en arbaron, ligis ĝin al arbo kaj detranĉis la voston. Li revenis kun la vosto kaj ŝovis ĝis duone la voston en la kampon. Poste li laŭte kriis en la direkto al la vilaĝo:

“Uhu! hu ho hu! La bovo ŝovis sin en la teron. Helpu! Ra—pi—de!”

Homoj alkuris de ĉiuj flankoj. Agu Dumba tenis la voston kun ŝajnigita penego. La vilaĝestro rapidis al li kaj brakumis lian talion por eltiri la bovon, sed ili ne sukcesis. Venis helpi la edzino de la vilaĝestro, sed ili kune tamen ne sukcesis. Venis ankaŭ la gefiloj de la estro. Ili sukcesis per unu forta tiro elterigi la voston, kaj ĉiuj abrupte falis teren unu sur alian. Tenante la voston en la mano, Agu Dumba kolere plendis: “Jen, jen! Kial vi uzis tiel grandan forton, ke ŝiriĝis ĝia vosto.”

“Ĝi forkuris! Ĝi certe kuris al la alia loko tra la tero.”

“Ni ofendis lama-templon!”

“Certe ! Certe ! ...” ĉiuj kredeme bruis. La vilaĝestro povis fari nenion alian, ol iri hejmen kun la vosto. En la nokto de tiu tago Agu Dumba enŝteliĝis en la arbaron kaj pelis la senvostan bovon hejmen.

Pasis kelke da monatoj. Iumatene la vilaĝestro ne donis matenmanĝon al Agu Dumba, sed ordonis lin ebenigi kampon. Agu Dumba protestis:

“Mi ankoraŭ ne matenmanĝis, do mi ne iros ebenigi la kampon.”

La estro ordonis lin dorse porti arbustobranĉojn,

sed li rifuzis pro la dornoj. La estro malpacientiĝis:

“Vi estas simple demono! Vi iam diris, ke vi bezonas nur unu bovlon da zanbao, sed, fakte, vi manĝas ege multe; mi ordonis vin plugi, sed vi lasis la bovon enteriĝi. Ve, ve! Tion aranĝis la fatalo. For de mi!”

“Kio? Ĉu tio estas tiel facila, ke mi foriru? Donu mian salajron!” Agu Dumba trankvile protestis.

Por pli frue foririgi Agu Dumba, la vilaĝestro konsentis la postulon, pensante, ke unu sako da zanbao ne gravas. Agu Dumba iris hejmen kaj revenis kun sakego. La estro ŝutis zanbaon en la sakegon, li ŝutis kaj ŝutis, sed la sakego neniam pleniĝis. Pensante, ke Agu Dumba neniel povos porti ĝin hejmen, li daŭrigis la ŝutadon. Fine la sakego pleniĝis, li hurlis al Agu Dumba:

“For kun via sakaĉo! Se survoje vi ripozos, mi reprenos ĉion!”

“Bone!” senhezite konsentis Agu Dumba. Li sin trenis kun la sakego sur la dorso. La vilaĝestro sendis sian filon por gvati Agu Dumba, dirante:

“Rigardu zorge! Antaŭ ol eliri el la vilaĝo, li haltos por ripozi.”

Kun tiel peza ŝarĝo Agu Dumba penege atingis la montpiedon. Li metis la sakon sur la teron kaj tuj reiris al la vilaĝestro:

“Oĉjo, dankon! Adiaŭ!”

“Kial vi ripozas?”

“Ne, tio ne estas ripozo. Mi forgesis vin adiaŭi.” Tion dirante, li eliris el la domo de la vilaĝestro. Li jam sufiĉe ripozis, denove surdorsigis la sakon kaj ekgrimpis

sur la monton. Atinginte la montosupron li havis neniom da forto por iri plu. Li do lasis la sakon, malsupreniris kaj venis al la hejmo de la vilaĝestro.

“Kial vi denove ripozas?”

“Ne! Ne por ripozi, sed por preni miajn botojn! Mi forgesis ilin en la ĉevalejo.” Tion dirinte, li eniris en la ĉevalejon, elprenis paron da eluzitaj botoj kaj foriris.

Li reprenis la sakon kaj komencis malsupreniri de la monto. La deiro estis ankoraŭ pli malfacila. Duonvoje lia forto estis tute elĉerpita. Li demetis la sakon kaj denove reiris al la domo de la vilaĝestro. Li diris al la estro:

“Se estonte vi bezonos dungiton, bonvolu revenigi min!”

“Kiu ankoraŭ volus redungi vin?” la estro eksplodis de kolero kaj manfrapis tablon. “Kial vi faras ripozon? Do la sako da zambao apartenas al mi.”

“Kio? Ĉu ĝi estas via? Mi tute ne ripozas. Mi venas por serĉi okupon.” Tion dirinte, Agu Dumba foriris. Tiamaniere li atingis sian hejmon, kiu situis ĉe la montpiedo.

* Zambao: faruno el rostita hordeo, ĉefmanĝaĵo de tibetanoj

** En Tibeto oni tiam kutimis plugi per du bovoj, liginte ŝnuron sur la kornoj de ambaŭ bovoj.

Buĉi Sanktan Bovon

Iun tagon Agu Dumba preterpasis iun vilaĝon. Li vidis du maldikulojn pene labori sur kampo. Ili jam estis tiel lacaj ke ili apenaŭ povis spiri, sed ili tamen ne ripozis eĉ momenton nek prepari manĝon, kvankam jam estis tagmezo. Li forte miris. Post pridemando li eksciis, ke ili estas sklavoj de bienulo, kiu permesas al ili preni nur unu manĝon en la tuta tago kaj postulas, ke ili laboru tiom kiom gruntbovo. Agu Dumba tre indignis. Li decidis tranokti en la vilaĝo.

Vespere Agu Dumba ŝtele elkondukis gruntbovon el la bovaro de bienulo, pendigis al ĝiaj oreloj sutrajn tolojn kaj venis al la bienulo por tranokti, deklarante, ke li estas ĉefservisto de granda prefekto kaj nun sendas la sanktan bovon al la templo. La bienulo iom dubis pri li, sed, vidinte la sutrajn tolojn sur la bo-oreloj, devis ĝentile akcepti lin. Antaŭ la enlitiĝo Agu Dumba serioze atentigis la bienulo:

“Bonvolu konduki la sanktan bovon al sekura loko. Se okazus io neatendita, vi ne povus kompensi eĉ per mil uncoj da arĝento!” Poste li kondifencis, ke li povos gajni 30 uncojn da arĝento, la bienulo ridis tiel energie, ke eĉ tremis la vangoj. “Estu trankvila! En mian ĉambron eĉ muso ne povas sin enŝovi,” li diris kun granda certeco.

Tenante buterlampo en mano, la bienulo atente kondukis kune kun Agu Dumba la “Sanktan bovon” en malplenan ĉambron.

Meznokte, kiam la bienulo dronis en profunda dormo, Agu Dumba ellitiĝis kaj enŝteliĝis en la ĉambron, kie tranoktis la “sankta bovo”. Li strangole mortigis la bovon per lanŝmnuro, dishakis ĝin en kelkajn pecojn, ĵetis unu bovfemuron en la stalon, kie la sklavo dormis, ŝmiris la lipojn kaj manojn de la du sklavo per bovsango kaj post tio reiris en sian ĉambron kaj trankvile endormiĝis.

Antaŭ ol tute mateniĝis, Agu Dumba iris en la ĉambron de la “sankta bovo”. Li lamente kriegis:

“Kia fatalaĵo! Oni buĉis la sanktan bovon!”

La bienulo, vekita de la bruoj, rapidis tien kaj ŝtoniĝis de teruro. Agu Dumba kaptis la bienulon je la brusto kaj muĝis:

“Vi diris, ke tien ĉi eĉ muso ne povas enŝoviĝi. Kiel do la sankta bovo estas buĉita?” Li tiris la bienulon por serĉi laŭ la spuro de bovsango. Li eksplodis de kolerego: “Aha! Vi aŭdacis instigi viajn sklavojn buĉi la sanktan bovon por manĝi! Ni kune iru al Lia Prefekta Moŝto!”

La bienulo kun ruĝiĝintaj okuloj insultadis la sklavojn: “Kian kuraĝon vi havas! Vi aŭdacas eĉ buĉi la sanktan bovon de Lia Prefekta Moŝto! Ĉu vi volas ribeli?” Poste li sin turnis al Agu Dumba kun ŝajnigita rido:

“Pro la Budho, mi donos al vi tri bovojn kiel kompenson.”

“Nur tri? Eĉ trivent ne sufiĉos!”

Havante nenian rimedon, la bienulo malice respondis:

“La afero fakte min ne koncernas. Tiu, kiu buĉis la bovon, devas kompensi per sia vivo. La krimuloj estas ĉi tie. Mortigu ilin aŭ faru alie laŭ via plaĉo.”

“Kiu respondecas pri tio, se ne vi?”

“Pri la krimo de bubalo tigro ne havas respondecon!”

Ili disputadis kaj fine interkonsentis, ke la bienulo donu dek bovojn kiel kompenson., kaj krome li devas doni la koncernajn sklavojn sub la dispono de Agu Dumba. Agu Dumba ŝajnis sin nevolonta konsenti, plue insultis, sed fine foriris kun la du sklavoj kaj dek bovoj.

Elirinte el la vilaĝo, Agu Dumba diris al la du sklavoj:

“Tuj dek bovoj nun apartenas al vi. Forkuru tuj, ĉiu kun kvin bovoj.”

La teruritaĵ sklavoj ne komprenis, kion Agu Dumba volas fari.

“De nun, vi ne plu estos sklavoj, sed liberuloj.”

Nur tiam ili komprenis la vortojn de Agu Dumba kaj, dankinte lin, foriris kun siaj bovoj.

Veti

Printempe la glacio kaj neĝo degelis. Herbetoj ekverdis kaj faris novan veston al la stepo. La paŝtistoj fariĝis pli kaj pli okupitaj. Aperis grego kaj grego da gruntbovoj, ĉevaloj kaj ŝafoj sur la stepo.

En tiu sezono la brutposedanto fariĝis ankoraŭ pli libera, senfara, kun stomako plena, korpo graseta. Ĉiutage li ĉasis plezuron en ŝakado kaj babilado kun la ekonomo.

Iutage la brutposedanto ŝakludis kun sia ekonomo en la tendo. Subite homo, kun ĉapelo sur la kapo, venis de malproksime. La ekonomo milde ektiris al la brutposedanto la manikon kaj diris:

“Jen venas Agu Dumba.”

Aŭdinte tiun nomon la brutposedanto tuj flamiĝis de malamo, ĉar li neniel povis forgesi la okazintaĵon en la lasta vintro: Li venis al la paŝtistoj por monkolekti, sed neniu volis pagi. Ili sin montris tute aliaj ol antaŭe. Sinteno obstina, lango sprita. Ili aŭ sukcesis prokrasti la pagon aŭ simple rifuzis. Li tiam tute ne komprenis la kialon, sed poste sciiĝis, ke tion kaŭzis Agu Dumba.

Hodiaŭ tiu Agu Dumba mem venis tien. La brutposedanto sidis kvazaŭ sur pingloj. Li skizis planon en la kapo por plej bone “regali” lin. “Per lazo kaptu galopan ĉevalon; per fremda mano batu malamikon.” Li okulesignis al la ekonomo kaj tiu ĉi tuj vokis Agu Dumba en la tendon.

“Bonvolu sidiĝi, Agu Dumba,” petis la

brutposedanto kun ŝajnigita rideto sur la vizaĝo.

Agu Dumba senĝene sidiĝis ĉe la forno. Subtenante la mentonon per sia pugno, li fikse rigardis la brutposedanton per duonfermitaj okuloj kaj demandis:

“Via Moŝto, kion vi volas instrui al mi?”

“Ej, ej! Hodiaŭ mi invitas vin ĉi tien por veti kun vi.”

“Bone! Je kio vi volas veti?”

“Ĉiuj aliaj diris, ke vi estas kuraĝa kaj ankaŭ atentema. Se vi kuraĝos tranokti en la Ferbastona Templo unu fojon; mi vetperdos al vi du gruntovojn.”

“Tranokti en la Ferbastona Templo!” Meditinte momenton, Agu Dumba ridete stariĝis, “Nu, estu tiel decidite!”

“Bone, dirite, farite! ” ruze ridis la brutposedanto kaj akompanis Agu Dumba el la tendo.

Kiam Agu Dumba foriris, la brutposedanto kaj lia ekonomo eksplodis per rido. Ĉiuj sciis, ke la lamaoj de la Ferbastona Templo estas tre batalemaj. Se iu enirus la templon ekster ritaj tagoj, li certe ricevus fortan bastonadon. Kompreneble ankaŭ Agu Dumba ne povos tion eviti, se li eniros. La brutposedanto decidis iri tien en la sekva mateno por vidi, kia estas la sekvo.

Agu Dumba iris kantante al la Ferbastona Templo. Atinginte la templon, li parade sin trudis internen. Renkonte venis la Ferbastona Lamao, la plej perfortema el la lamaoj en la templo. Vidinte nekonaton eniri, la lamao tuj levis ferman bastonon kaj kriis:

“Haltu! Por kio vi venis ĉi tien? Ĉu vi ne scias, ke hodiaŭ ne estas tago por incensado?”

Agu Dumba faris gravan mienon: “Mi venis laŭ ordono de mia mastro por informi vian ĉeflamaon pri iu grava afero.”

“Kia afero? Diru al mi!”

“Nu, bone. Mia mastro faris voton al la Budho lastjare; kaj ĉi-jare li vere ricevis bonegan rikolton. Li sendis min ĉi tien por informi vin, ke morgaŭ li ekspedos al vi tridek gruntbovojn dediĉitajn al la Budho.”

“Tri dekojn da gruntbovoj!” ridis de ĝojo la lamao.

“Jes!” daŭrigis Agu Dumba, teksante belan rakonton, ke lia mastro estas riĉega kaj tiel pia, ke li intencas donaci ankaŭ monon por riparo de la templo. La diro ankoraŭ pli ĝojigis la lamaon, kiu ĝentile akceptis Agu Dumba, regalis lin per la plej bona buterteo kaj kondukis lin en la plej bonan ĉambron por tranokti.

La sekvan frumatemon, kiam estis ankoraŭ mallume, Agu Dumba jam ellitiĝis. Tiam ĉiuj lamaoj ankoraŭ trankvile ronkis. Li ŝtele malfermis la pordon de la templo kaj foriris kun tri pakoj da teo.

Survoje li baldaŭ renkontis la brutposedanton, kiu venis tien por rigardi la rezulton de sia ruzaĵo. La brutposedanto vidis, ke Agu Dumba gaje revenas kun tri pakoj da teo surdorse. Li tre miris kaj demandis envie:

“De kie vi akiris tiujn pakojn?”

“Donacis la Ferbastona Templo.”

“Ĉu vere?” haste demandis la brutposedanto. “Ĉu

ankaŭ mi povas ricevi donacon? Kiel vi opinias?”

“Certe! Hodiaŭ estas bazartago ĉe la templo. La ĉeflamo amas aŭskulti popolkanton. Li donacas teopakon al ĉiu, kiu kantas. Vidu, mi kantis nur tri kantojn kaj ricevis tiom, ke mi nun devas ŝvitegi pro la ŝarĝo.”

“Ha, ha! Mi povoscias multajn popolkantojn!” La brutposedanto volis tuj iri per azeno.

“Momenton!” Agu Dumba baris al li la vojon kaj daŭrigis: “La templo almozdonas nur al malriĉuloj. Vi rajdas sur azeno, surhavas peltaĵon. Ili certe forpelos vin.”

“Kion fari?” malpacienciĝis la brutposedanto. Rimarkinte, ke Agu Dumba portas nur feltan ĉifonaĵon, li tuj petis:

“Ni interŝanĝu niajn vestojn, ĉu bone?”

“Ne, ne. La feltaĵon mia paĉjo heredis de la avo. Tre varmiga.”

“Akirinte teopakon, mi tuj redonos al vi,” petegis la brutposedanto.

“Nu bone, bone,” konsentis Agu Dumba kun mieno de ŝajnigita grandanimeco. “Mi atendos tie ĉi. Nur revenu kiel eble plej rapide!”

La brutposedanto kapjesadis, rapide alivestis sin per la feltĉifonaĵo, konfidis sian azenon al Agu Dumba kaj hastis al la Ferbastona Templo.

Ĵus tagiĝis, kiam li, spiregante, atingis la templon. Li tuj kantis el la tuta gorĝo. Ĉiuj lamaoj vekiĝis de la kantado. La Ferbastona Lamao eliris kun aliaj lamaoj.

Jen faŭkas la templa pordo, el la teopakoj mankas tri, tiom pli, kantaĉas freneza ĉifonulo ! La Ferbastona Lamao furioziĝis kaj sin ĵetis kun fera bastono al la brutposedanto.

“Mi pistos cin, trompisto!”

Ankaŭ la aliaj lamaoj svarme sin ĵetis al la brutposedanto. Ili draŝis lin tiom, ke li baniĝi sen sango.

Agu Dumba, vestita per la riĉula peltaĵo, hejmen pelis la azenon ŝargitan per la tri teopakoj. Li diris al aliaj survoje:

“Morgaŭ mi iros al la brutposedanto por du vetgajnitaj gruntbovoj.”

Avidema Komercisto

Foje estis iu granda komercisto tre avidema kaj insidema. Li ofte vendis strasojn en la bazaro de Lasao por troprofito. Informite pri tio, Agu Dumba tre indignis kaj decidis doni al li severan punon.

Iun tagon Agu Dumba iris kun argila pota en la mano al la vojo, kiun la profiteza komercisto kutimis laŭiri por viziti Lasao. Li fosis kavon en la herboriĉa deklivo apud la vojo, bruligis en ĝi sekan bovfekaĵon kaj surmetis la poton kun akvo kaj teo. Baldaŭ la teo ekbolis. Poste li forprenis la poton, metis sur la fajron maldikan ŝtonplaton kaj kovris la ĉirkaŭan randon per tero. Post tio li metis la poton sur la mezon de la ŝtonplato kaj lasis la teon daŭre boli. Ĉio estis en ordo. Li sidis apude, manĝis zanbaon kaj trinkis teon.

Ĝuste tiam la granda komercisto venis rajdante. Li vidis, ke iu trinkas teon apud la vojo. Ŝajnis al li, ke ankaŭ li malsatas kaj soifas. Li do deĉevaliĝis kaj iris al Agu Dumba. Vidinte lin alveni, Agu Dumba tuj stariĝis por saluti:

“Bonan matenon, estimata gasto. Bonvolu veni ĉi tien, trinki teon kaj iom ripozi!”

La komercisto alproksimiĝis kaj, verŝonte teon, tute surpriziĝis. Li vidis nenian fajron, sed la teo en la pota mem bolis.

“Kio tio estas? Kie vi aĉetis tiun poton?” li mire demandis.

“Kio? Pri kio vi demandis?” Agu Dumba ŝajnis sin ne kompreni.

“Mi demandas pri tiu poto. Kial la teo bolas en ĝi sen ajna fajro? Kie vi ĝin aĉetis? Vendu ĝin al mi! Mi aĉetos ĝin eĉ kontraŭ alta prezo.”

“Tio ĉi estas magia poto, nenie aĉetebla! Ne subtaksu ĝin. Ĝi estas ja trezoro de mia familio jam de multaj generacioj.”

“Frato, ĉu vere oni povas boligi teon en tiu poto sen fari fajron?”

“Certe. Se ne, kiel ĝi povus esti trezora heredaĵo?”

“Vendu ĝin al mi! Mi pagos, 50 uncojn da argento.”

“Ne ŝercu! Tiu ĉi magia poto estas trezoro de mia familio. Neniel mi povus ĝin forvendi!”

“Ne rifuzu! Mi aldonos ĉiujn varojn ĉi-tieajn. Ĉu ankoraŭ ne sufiĉas?”

“Ne ĝenu min! Jam ne frue. Mi devas iri.”

“Nu, mi aldonos ankaŭ ĉi tiun plej amatan ĉevalon. Konsentite?”

Eĉ ne lasante al Agu Dumba malfermi la buŝon, li metis siajn arĝenton, varojn kaj ĉevalon antaŭ Agu Dumba kaj tuj foriris kun la “magia poto”.

La komercisto iris sufiĉe malproksimen, Agu Dumba kriis:

“Ho hoj! Momenton! Memoru, antaŭ ol ĝin uzi, vi devas diri la magian formulon *mali* kaj per bastono ĝin frapi trifoje. Alie ĝi ne povas boligi teon. Se la teo ankoraŭ ne bolas, ankoraŭ iom frapu. Vi tamen nepre devas esti pia. . .”

La avidema komercisto pensis, ke jam venis al li bonŝanco por parveniĝi. Li rapidis al Lasao por vendi la poton sur la plej homplena strato. Li laŭte kriis: “Magia poto, magia poto! Aĉetu la magian poton, per kiu oni povas boligi teon sen hejtaĵo.”

Momente homoj alsvarmis ĉirkaŭ li por rigardi la kuriozaĵon. La rigardantoj pli kaj pli multiĝis, kaj la komercisto tre ĝojis. Li sidiĝis sur la tero, krucinte la krurojn, kaj metis antaŭ si la argilan poton. Li litaniis la formulon *mali*. Post tio li frapetis la poton trifoje per bastono. Li atendis momenton — la teo ne bolis, li ree frapetis trifoje — la teo ankoraŭ ne bolis. Tiam la rigardantoj ekbruis, kaj li malaplombiĝis.

“Ne ridu, sinjoroj! Eble mi frapis tro malforte,” li diris kaj forte batis la poton per la bastono. Krak! la “magia poto” disrompiĝis kaj la akvo kun la tefolioj elfluis. La ĉirkaŭantoj ekridis, ridegis kaj disiris, lasante la avideman komerciston en embaraso. Nur post longa tempo li ekkonsciis la trompiĝon. Li do rapidis serĉi Agu Dumba.

Disdoninte la ĉevalon, arĝenton kaj varojn al malriĉuloj, ankaŭ Agu Dumba venis al Lasao. Vidante la komerciston veni rekte al li, li sin turnis al la templo Gandan. Tiam en la Budha halo la lamaoj laŭtlegis sutron. Iliaj botoj estis ekster la pordo. Agu Dumba elingigis sian tranĉilon kaj ŝajnis, ke li detranĉas botkalkanumon. Vidinte de malproksime, ke Agu Dumba eniras la templon, la komercisto alkuris tien. Proksimiĝinte, li vidis, ke Agu Dumba fervore laboras

super detranĉado de botkalkanumo.

“Fi! Kian magian poton vi vendis al mi! Tuj redonu miajn varojn, arĝenton kaj ĉevalon. Ne kredu, ke mi vin ne trovos!” li diris spiregante de kolero.

“Kio okazis al la magia poto? Ja vi mem devigis min vendi ĝin! Se vi volas repreni la varojn, arĝenton kaj la ĉevalon, redonu mian magian poton!”

Aŭdinte tion, la komercisto pensis, ke Agu Dumba ne estas facile traktebla kaj krome havas planan motivon. Tial li ŝanĝis sian tonon kaj diris:

“La magian poton mi jam disrompis pro neatento. Ĉion mi donas al vi kiel kompenson, sed la ĉevalon vi devas redoni al mi, ĉar ĝi estas mia koro.”

“Via ĉevalo estas en mia hejmo.”

“Nu bone, ni iru kune!”

“Sed nun mi havas gravan aferon. Vidu, mi devas detranĉi botkalkanumon. La taskon donis al mi la ĉeflamao. Se mi forlasos sen permeso la okupon, mi ricevos punon.”

“Nu, iru konduki la ĉevalon, kaj mi detranĉos anstataŭ vi.”

La komercisto elprenis sian tranĉilon kaj komencis detranĉi kalkanumon, dum Agu Dumbajam sin pafis for.

La lamaoj finis sian sutrolegadon kaj eliris el la Budha halo. Rimarkinte, ke ĉiuj botoj jam senkalkanumiĝis, ili kolere sin ĵetis al la komercisto kaj ĝissate lin batis.

“Kiu instigis vin tion fari?”

“Agu Dumba diris, ke mi faru tion pro ordono de la

ĉeflamao. Li foriris por konduki ĉevalon.”

“Mensogo! La Budho vin ne indulgos!” ili kriis kaj elpelis lin el la templo per batoj kaj puŝoj.

Kazaĥaj popolrakontoj

Hoĝa Nasar kaj la Ĥano

Iun tagon Hoĝa Nasar kverelis kun iu riĉulo. Neniu povis konvinki la alian, tiel ke ili fine venis al la Ĥano por peti lian juĝon.

Hoĝa Nasar iam antaŭvidis, ke la riĉulo subaĉetos la Ĥanon, kaj tiu ci parolos por la riĉulo. Tial li kaŝis ŝtonon en la sino kaj tiel iris al la Ĥano. Aŭskultinte la pledojn de ambaŭ flankoj, la Ĥano jam estis preta verdikti, kiam Hoĝa Nasar ektusis. La Ĥano ĵetis al li rigardon, kaj Hoĝa Nasar per pugno montris al li sian sinon. Vidinte la pufan sinon de Hoĝa Nasar, la Ĥano supozis, ke Hoĝa Nasar portas al li oron aŭ arĝenton. Li ĝoje pensis: Hoĝa Nasar certe sugestas al mi, ke se mi parolos por li, li donos la tutan oron al mi. Li do serioze deklaris, ke Hoĝa Nasar estas senkulpa. La riĉulo tre malkontentis pro la verdikto kaj kolere foriris.

Post la foriro de la riĉulo, la Ĥano kun ruza mieno vokis Hoĝa Nasar al si:

“Ho, frato Hoĝa, mi devigis la riĉulon konfesi sian malvenkon antaŭ vi, vi kredeble estas kontenta pri mi! Nun vi jam devas doni al mi la oron kaŝitan en via sino.”

“Via Ĥana Moŝto, mi ja alportis al vi nek oron nek arĝenton. Tio estas nur ŝtono.” Dirante, Hoĝa Nasar elprenis la kaŝitan ŝtonon kaj faligis ĝin antaŭ la Ĥano.

“Kion do signifis tio, ke vi montris al via sino per la pugno kaj okulsignis al mi, antaŭ ol mi verdiktis?”

malkontente demandis la ĥano.

Hoĝa Nasar aplombe respondis: “Ehe! Via Ĥana Moŝto, per tio mi sugestis al vi, ke vi estu justa, alie mi mortigos vin per la ŝtono.”

La ĥano havis nenion por respondi kaj povis nur lasi lin hejmeniri.

Odoro de Manĝaĵo kaj Sono de

Mono

Iun tagon, promenante sur strato, Hoĝa Nasar aŭdis bruon el apuda manĝejo. Enirinte kun scivolo, li vidis, ke la grasa mastro batas iun malriĉulon, kies vesto estis disŝirita, sed la senkompata mastro ankoraŭ batadis kaj blasfemadis.

Hoĝa Nasar hasteme aliris por interpacigi ilin. Li tiris flanken la kompatindan malriĉulon kaj demandis la mastron:

“Kial vi lin batas?”

“Mi batas la aĉulon pro tio,” kolere respondis la dikulo, “ke li pagis al mi nenion sed jam volas forkuri.”

“Kion de vi li manĝis? Kiom li devas pagi al vi?”

Hoĝa Nasar plue demandis.

“Enirinte en mian manĝejon,” la mastro klarigis kun plena certeco, “li elprenis sian sekan pastaĵon, sed ne manĝis dum longa tempo. Li ĝin manĝis nur tiam, kiam la bonodoro el mia kuirejo penetris en lian pastaĵon. Kompreneble li devas pagi al mi, ĉar tiu bonodoro de mia manĝaĵo ne estas senkosta.”

Finaŭskultinte, Hoĝa Nasar diris: “Ho jes! Vi diris prave.” Poste, turninte sin al la malriĉulo, li demandis: “Do, klarigu vian motivon!”

“Estas vere,” respondis la malriĉulo, “ke mi alvenis al lia manĝejo kaj, sidante sur la sojlo, manĝis mian pastaĵon. Komence mi volis aĉeti pladon, sed,

bedaŭrinde, ĉi tie la pladoj estas tro multekostaj, tiel ke mia mono ne sufiĉas. Mi do atendis por almozpeta restaĵon de plado, sed tio vekis nenian kompaton en tiu ĉi avara mastro kaj li donis al mi nenion. Mi povis nur manĝi mian propran. Ĉu pro tio mi devas pagi al li monon?”

Hoĝa Nasar kapjesis kaj diris: “Jes, ankaŭ vi diris prave. Sed ĉu vi havas monon?”

La malriĉulo veis: “Mi havas nur du-tri moneretojn.”

“Nu, donu al mi!” la dika mastro diris ĉeflanke. “Ne gravas, ke estas malmulte. Alie vi ne pensu pri foriro.” Kaj li etendis la manon por kapti la moneretojn.

“Nu, mastro, ne malpacienciĝu.” Hoĝa Nasar lin haltigis. “Iru flanken kaj atendu momenton.”

Kiam la dikulo foriris, Hoĝa Nasar interflustris kun la malriĉulo kelkajn vortojn kaj poste prenis de li la moneretojn. Tenante ilin per ambaŭ manoj, li kriis: “Mastro, bonvolu veni.” Kredante, ke li certe ricevos multe da mono, la monavida grasulo ĝoje alkuris kaj diris al Hoĝa Nasar: “Dankon! Dankon!” Hoĝa Nasar tenis la moneretojn per ambaŭ manoj, sed post kelkfoja forta svingado de la moneretoj ĉe lia orelo, redonis ilin al la malriĉulo kaj diris: “Ankaŭ vi atendu momenton.”

La dika mastro ege malpacienciĝis kaj ekkriis:

“Kion vi volas? Kial vi ne donas al mi la monon?”

“Mi preferas fari aferojn juste,” pacience diris Hoĝa Nasar. “Li ne manĝis vian manĝaĵon sed nur flaris

la odoron, ĉu ne? Tamen ankaŭ vi aŭdis la sonon de lia mono. Tio estas egalprofito por vi ambaŭ. Tiu odoreto de via manĝaĵo samvaloras kiel la tinteto de tiuj moneroj. Kion vi ankoraŭ volas?"

Kolerega, la dika mastro povis diri nenion krom gapi. La malriĉulo dankeme kaj firme manpremis kun Hoĝa Nasar, kaj ili kune foriris.

Rakontoj pri Aldil Kusa

Rajdi sur Demono

Foje Aldil Kusa vojaĝis. Survoje li renkontis demonon, kiu pens, ke ili kune iru, akompanante unu la alian. Kusa konsentis. Ili do komencis fari longan kaj malfacilan vojaĝon. Post longa irado ili ambaŭ ege laciĝis. Subite venis al la demono ideo gajni ian avantaĝon super Aldil Kusa.

“Amiko!” diris la demono. “Estas tute laciĝe kaj tede fari tian longan marŝadon. Kial ni ne rajdu unu sur la alia alterne.”

“Bonege! Bonege!” tutkore aprobis Aldil Kusa. “Sed kiu la unua rajdos? Pri tio ni devas bone interkonsiliĝi.”

La demono iom pripensis kaj poste respondis: “Ni faru laŭ la kutimo de la kazaĥoj. Pliiĝulo devas esti respektata. Unue la pliaĝa rajdos.”

“Bona ideo!” diris Aldil Kusa. “Diru do, kian aĝon vi havas! ”

La demono respondis memkontente:

*“Kiam mi naskitis,
kosmon mi jam vidis.
Tiam grandis tero nia
ĝuste kiel mano mia.”*

Aŭdinte tion, Aldil Kusa subite ekploris. Surprizite, la demono demandis:

“He! Kio okazis al vi? Ĉu vin ĉagrenas, ke mi la unua devas rajdi sur vi?”

Nee skuante la kapon, Aldil Kusa ankoraŭ pli funebre ploris.

“Kio do estas al vi? Diru!”, admonis la demono.

Aldil Kusa suspiris: “Kiam vi menciis vian naskiĝan tempon, mi tuj ekmemoris mian malĝojan pasintaĵon:

*“Kiam vi naskitis,
nupton mi rapidis.
Rajde filon mi kunportis;
sed ve! Li survoje mortis.”*

Parolante, li skuis la kapon kaj sulkigis la frunton,” ŝajnigante sin tre malĝoja. La demono lin konsolis, dirante:

“Nu, se estis tiel, bonvolu rajdi sur miaj ŝultroj! Via malfeliĉo ja estas sufiĉe granda.”

Aldil Kusa eksaltis kaj rajdis sur la ŝultroj de la demono, dirante:

“Ho, kara akompananto! Vi tre respektas maljunulon. Ek!”

“Kiel longe vi rajdos?” demandis la demono. “Mi kantos, kaj sidados ĝis la kanto finiĝos.” Tion dirinte, Aldil Kusa ekkantis: “A-lo-laj! A-lo-laj! ...”

Post longa marŝado la demono ege laciĝis kaj demandis:

“Kiam vi finos tiun ‘A-lo-laj’?”

“La kanto ‘A-lo-laj’ ankoraŭ ne finiĝis. Eĉ kiam ĝi

finiĝos, mi ankoraŭ kantos ‘A-li-ja-da’! ” respondis Aldil Kusa.

Aldil Kusa senfine kantis “A-lo-laj” dum la demono morte lacis. Poste ĝi elpensis metodon por sin liberigi de li. Kiam ili ripozis ie, ĝi demandis:

“Por ĉiu en la mondo troviĝas io plej timinda — do, kara kunulo, diru al mi, kio estas la plej timinda por vi.”

“Ĉu vi demandas, kio estas la plej timinda por mi?” Aldil Kusa respondis, “Ho, jes! Tio estas nenio alia ol ĉevalkolbaso kaj kumiso.”

Kiam Aldil Kusa endormiĝis, la demono iris por ĉevalkolbaso kaj kumiso. Reveninte, ĝi metis ilin apud Aldil Kusa kaj pensis, ke vekiĝinte li certe forkuros de teruriĝo.

La sekvan tagon, vekiĝinte, Aldil Kusa vidis antaŭ si la pretajn ĉevalkolbasojn kaj kumison, sed diris nenion. Li nur manĝis kaj trinkis.

“Ĉu vi ne tunas tiujn du aĵojn?” mire demandis la demono.

“Jes,” Aldil Kusa respondis ruktante, “ĝuste pro tio, ke mi tre timas ilin, mi devis kiel eble plej rapide ilin dismaĉi kaj engluti, por ke nenio danĝera estiĝu. Nu, ni ekiru!”

Aldil Kusa denove rajdis sur la ŝultroj de la demono, senfine kantadis “A-lo-laj” kaj “li-ja-da” kaj satĝuis survoje la belajn pejzaĝojn. Li opiniis, ke la longa vojaĝo estas vere la plejplezura.

Jaŭ-nacieca* popolrakonto

Bakonto pri Buho

Memvarmiga Kaldrono

Buho tutkore helpis malriĉulojn kaj tute ne atentis, ke li mem ŝuldas al sia bopatro terrenton kaj prunton je procentego. Kiam lia edzino kun maltrankvila vizaĝo atentigis lin pri tio, lia mono jam estis tute disdonita:

“Kion ni faru?” demandis lia edzino.

“Unue helpu ĉiujn aliajn venki malfacilaĵojn. Por ni mem ni serĉu alian elirejon!” respondis Buho.

“Ĉe la jarfino** nur monon preparolos kaj postulos mia avara patro. Per kio vi pagos al li?”

“Mi jam diris, ke ni elturniĝos!”

Buho turnis la okulojn al la forno kaj, montrante la iom difektitan kaldronon, diris:

“Ni interŝanĝu kun via patro tiun kaldronon kontraŭ 1500 moneroj.”

“Absurde!”

“Via patro havas multe da maljuste akirita mono, do nenio gravas, se ni iom uzos!”

“Mi ne kredas, ke tiu avarulo aĉetos tiun difektitan kaldronon kontraŭ 1500 moneroj,” protestis lia edzino paŭze.

“Ni vidos!”

Iun tagon Buho invitis la bienulo-bopatron. Li diktis al la edzino, ke antaŭ la alveno de sia patro ŝi varmigu la kaldronon ruĝarda kaj metu ĝin en la supran etaĝon. Informite, ke estos bongustaĵoj ĉe lia bofilo, la bienulo alvenis kun granda ĝojo. Sidiginte lin ce la tablo,

Buho diris al sia edzino:

“Paĉjo malsatas, tuj komencu prepari manĝaĵojn.”

Aŭdinte, ke la manĝaĵoj ankoraŭ ne estas pretaj, la bienulo salivis de maltrankviliĝo.

La edzino de Buho iris en la supran etaĝon kun ovoj, kaj aŭdigis tintsonado de kaldrono. Post momento ŝi alportis teleron da fritita ovaĵo kaj tuj post tio ankaŭ pladon da antaŭe varmigita porkaĵo. “Kial oni kuiras supre kaj kiel la manĝaĵo povas esti pretigita nur post mia momenta sido?” La bienulo scivolis kaj tuj supreniris por rigardi, kio okazas tie, sen penso pri tio, ĉu la bofilo lasas aŭ ne. La supra ĉambro estis preskaŭ malplena escepte de tio, ke en la mezo estis la difektita kaldrono. Alproksimiĝante al ĝi, li eksentis ĝian varmon. Ŝajnigante sin maltrankvila, Buho diris:

“Tiu ĉi kaldrono estas heredita trezoro de mia familio. Ĝi estas memvarmiga kaldrono. Ĉiu manĝaĵo, ĉu seka ĉu freŝa, tuj kuiriĝas, se nur oni metas ĝin en la kaldronon. Tion mi neniam diris al aliaj, kaj mi esperas, ke ankaŭ vi, bopatro, ne disfamigos ĝin!”

La kalkulema bienulo pensis, ke se la manĝaĵoj memkuiriĝus, li povus multe ŝpari el la pago por brulligno, se ne paroli pri ĉiama parado per ĝi antaŭ aliaj homoj. Li do diris:

“Mia kara bofilo, vendu al mi vian memvarmigan kaldronon!”

“Ne, ne,” kapskuante respondis Buho, “mi ne vendos, ni malriĉuloj havas multe da laboroj, sed mankas al ni laborfortoj kaj ni apenaŭ havas tempon por

kolekti brullignon.”

Paŭtante, lia edzino diris ĉeflanke: “Per kio vi pagos la ĉi-jaran terrenton, se vi ne vendos ĝin?”

Sekvante la vortojn de sia filino, la bienulo haste aldiris:

“Se vi donos al mi la kaldronon, mi liberigos vin de la ĉi-jara terrento. kaj krome mi donos 1500 uncojn da arĝento.”

Finfine la negoco sukcesis. La bienulo estis tiel ĝoja, ke li jam ne volis manĝi sed tuj hejmeniris, kunportante la kaldronon.

Kiam la bienulo jam estis for je dekoj da paŝoj, Buho ekkriis: “Bopatro,” kaj tuj elkuris el la domo. Timante, ke la bofilo ŝanĝis sian decidon, la bienulo tuj ekkuris. Buho malrapide lin postkuris. Nur kiam la bienulo jam kuris pli ol dek liojn kaj jam ege laciĝis, Buho lin kuratingis kaj klarigis:

“Ĉi tiu kaldrono estas efika nur por tia homo, kiun la sorto favoras. Ŝmiru ĝin per lardo kaj pendigu ĝin sur trabo. Vi havos feliĉon ĝin uzi nur post tri tagoj, se ĝi restos sen ŝanĝa. “

La bienulo pensis: Mi, milionulo, kompreneble havas fortunon. Ke mi devas pendigi ĝin tri tagojn, ne gravas. Ne gravas, eĉ se dek tagojn! Laŭ la vortoj de Buho, li priŝmiris la tutan kaldronon per lardo kaj tiel ankaŭ la pendŝnuron. Poste li pendigis la kaldronon sur trabo.

Nokte, muso venis al la trabo, flaris la eksterordinaran odoron de la ŝnuro kaj tuj ĝin

ekmordis. Antaŭ ol alvenis la noktomezo, subite aŭdiĝis bruo “pum”. La bienulo hasteme ellitiĝis, rapidis al la salono kaj vidis, ke la “memvarmiga kaldrono” jam dispeciĝis. Li diris ĉagrene:

“Ho ve, do mia sorto estas malbona.”

* Jaŭ-nacieco: nacimalplimulto en Ĉinio, loĝanta en montregionoj de Guangxi, Hunan, Yunnan, Guangdong kaj Guizhou

** Jarfino: iam en Ĉinio la tradicia tempo por kolekti ŝuldojn

